

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

januaro/februaro/marto 1989



## **41a IFEF-Kongreso en Salou / Hispanio** **13a ĝis 19a de majo 1989**



Kongresejo en la „Costa Dorada“

foto: Raymond S.A., Tarragona

# Hispanio invitas al IFEF-kongreso

**Post Barcelona (1961) kaj Taragona (1974) la ĉemara banloko Salou estos la gastiganta urbo de la 41a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso. Al tiu aranĝo, kiu okazos de la 13a ĝis la 19a de majo 1989, estas kore invitataj membroj kaj amikoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA).**

La vojaĝo per fervojo al Hispanio daŭros iom pli longe ol lastjare al Perpignan/Francio. Vidu ankaŭ la germanlingvajn vojaĝproponojn. Tamen la organizantoj elektis favoran urbon situantan ĉe la t.n. Costa Dorada. Dum majo la klimato estas agrabla; la meza temperaturo estas ĉirkaŭ 18 gradoj C, do bonega okazo por kombini kongresajn laborojn kun feriado.

Kvankam Salou fondita de la Fenicoj povas ririgardi al dumiljara historio, ne plu estas videblaj multaj restaĵoj el la romia kaj mezepoka periodoj, ekzemple la Antikva Turo (Torre Vella) el la jaro 1530. Tiutempe la enloĝantoj devis konstrui remparojn por defendi sin kontraŭ malamikoj kaj piratoj. Hodiaŭ markas la aspekton larĝaj avenuoj, aleoj da palmoj, grandstilaj elegantaj konstruaĵoj kaj precipe la multnombraj vagantaj kaj sin banantaj turistoj. Unu hotelo viciĝas post la alia ĉe strando kaj rokoj.

Kaj en tia tristela hotelo nomita „Negresco“ disvolviĝos la kongresaj aranĝoj, escepte de la inaŭguro, kaj tie loĝos ankaŭ la plej multaj, sed ne ĉiuj kongresanoj. Tiurilate la informo en la aliĝilo, ke la kongresejo estos en la Antikva Turo, ne plu estas aktuala. La hotelo Negresco situas malproksime de la centro kaj de la stacidomo en la kvartalo Cap de Salou, rekte ĉe la maro. La strato estas Carrer Replanelis 12, la telefona numero (el FR Germanio) estas 003477-370392.

Kiel en antaŭaj jaroj la laborprogramo kun siaj kunsidoj, kunvenoj de fakaj komisionoj, fakprelego ktp. okazos laŭ la kutima maniero. Dum tri vesperoj la kongresanoj ĝuos abundan prezentadon el la kataluna kulturo: dancoj, muzikoj,

folkloroj. Kiu ne rememoras volonte pri la mirinda spektaklo sur la foirplaco de Taragono, kiun povis spekti ankaŭ multnombraj enloĝantoj!

Tri aŭtobusekskursoj estas projektitaj. Unu duontaga laŭlonge de la Ruto de vino. Celo estas kompreneble vinkelo, kiu invitas al vingustumado. Alia ekskurso ofertas revidon nur la antikva urbo Taragono. Krome oni vizitos en Reus la plej grandan agrikulturan kooperativon en Hispanio. La tuttaga ekskurso kondukos al la delto de Ebro la plej granda rivero de Hispanio.

Tie ekestis naturparko por protekti la migrantajn birdojn devenantajn el norda Eŭropo. Oni povos observi la vivmanieron de diversaj birdoj, al kio utilas binoklo.

Kiu ne preferas reveturi per la speciala Esperanto-trajno al Cerbère trafikanta cetero ankaŭ la 13an de majo inter Port-Bou kaj Salou, povos ekvojaĝi al la postkongreso sur la insulo Majorko. Bedaŭrinde mankas nuntempe detaloj pri tiu projekto. La vojaĝo tien estas planita por la 20a de majo, la vojaĝo reen la 24an de majo. Supozeble la Internacia Fervojisto komunikos pluajn informojn.

Al tiu certe grandioza 41a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) kaj al la sekva postkongreso estas atendotaj multnombraj geamikoj el nia lando. Pro tio aliĝu kiel eble plej baldaŭ. Ne forgesu ĝiri ne nur la sumon de la kongreskotizo, sed ankaŭ la hotelkostojn por minimume unu tago. Vidu detalojn pri prezoj en la aliĝilo kaj en la germanlingva artikolo. Komuna flugvojaĝo ne estas planita. Bv. informi vin en vojaĝagentejo pri farvorprezaj ofertoj. Ĝis revido la 13an de majo 1989 en Salou! W.B.

## Alloga oferto

Fr-ino Tanja Berger, Chr. Coulinstr.9, A-4020 Linz, en junio/julio 1989 intencas vojaĝi post sia abiturienta akzameno per la Transsiberia Fervojto al Peking.

Ŝi serĉas esperantist(in) on aŭ grupon el germanlingva lando, kun kiuj ŝi povus komune vojaĝi. Fr-ino Berger estas komencantino. Interesuloj bv. rekte kontakti kun ŝi.



## Dort, wo die Zitronen blühen

Der Internationale Verband der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) wird seine nächste Tagung wiederum im Süden Europas abhalten. Zur Teilnahme an diesem Kongreß, der vom 13. bis 19. Mai 1989 in Salou an der spanischen Mittelmeerküste stattfindet, lädt die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) ihre Mitglieder und Freunde herzlich ein.

Den Teilnehmern, die nicht den Umweg über Paris wählen, werden für die Hinreise zwei Zugverbindungen empfohlen:

- EC 77 (Mont Blanc) Hamburg - Frankfurt - Basel - Genf mit Liegewagen Basel SBB - Port-Bou, der in Genf auf den Hispania-Express übergeht; Ankunft in Port-Bou um 5.42 Uhr; Weiterfahrt mit angekündigtem Esperanto-Sonderzug, Abfahrt 8.00 Uhr, Ankunft in Salou 11.34 Uhr.
- D 1173 Dortmund - Frankfurt - Straßburg; von dort um 20.24 Uhr mit Liegewagen nach Port-Bou; Ankunft 9.30 Uhr. Weiterfahrt mit Talgo 462 (Mare Nostrum) um 10.00 Uhr (Reservierungspflicht!); Ankunft in Salou 13.09 Uhr oder Eilzug ab Port-Bou um 10.34 Uhr; Umsteigen in Barcelona Sants; Ankunft in Salou um 15.03 Uhr.

Salou war schon zu Zeiten der römischen Besetzung ein aufstrebender Hafen. Von dort nahmen im 13. Jahrhundert Eroberungszüge nach der Insel Mallorca ihren Ausgang. Später wurden zur Abwehr von feindlichen Überfällen Befestigungsanlagen errichtet, von denen sich allerdings nur noch wenig erhalten hat. Sprache und Lebensart sind wie im Raum Perpignan/Südfrankreich katalonisch geprägt. Reger Handel und Sinn für erfolgreiche Unternehmungen führten zu grundlegenden Veränderungen in der Struktur des Ortes. Heute ist Salou ein eleganter Seebadeort an der sogenannten Costa Dorada, der fast immer von Touristen bevölkert ist. An der 13 km langen Küste reiht sich ein modernes Hotel an das andere.

In einem solchen Drei-Sterne-Hotel namens Negresco, und nicht, wie auf dem Anmeldevordruck als „Alter Turm“ (Torre Vella) angegeben, findet der Eisenbahner-Esperanto-Kongreß statt. Dort werden auch die meisten Teilnehmer untergebracht. Das Kongreßgebäude liegt

am Meer, abseits vom Zentrum und damit auch vom Bahnhof. Ein anderes Hotel gleicher Kategorie in der Nähe soll die übrigen Gäste aufnehmen, soweit nicht dort ebenfalls vorhandene Ferienwohnungen bevorzugt werden.

Die Preise sind angemessen. Zu empfehlen ist Vollpension; für eine Person im Doppelzimmer mit Dusche (Kategorie B) sind etwa 30,- DM/Tag zu zahlen. Einzelzimmer mit Dusche kosten 38,- DM/Tag. Für Zimmer der Kategorie A (mit Bad) erhöht sich der Preis um etwa 5,- DM/Tag. Wenn Zimmer nur mit Frühstück gewünscht werden, ermäßigt sich der Preis nur um etwa 4,- DM/Tag.

Das Kongreßprogramm sieht im fachlichen Teil mehrere Arbeitssitzungen für Delegierte und Interessierte vor. Der Fachvortrag wird sich mit dem Vorhaben der RENFE befassen, den Eisenbahnverkehr zwischen Port-Bou und Barcelona auch auf einer Strecke mit Normalspur zu ermöglichen. An drei Abenden wird den Teilnehmern das reiche kulturelle Leben Kataloniens vorgeführt. Wer erinnert sich nicht gerne an die großartige Folkloreveranstaltung auf dem Marktplatz von Tarragona vor 15 Jahren!

Aber auch der touristische Teil des Beiprogramms führt zu lohnenswerten Zielen. Einer der beiden Halbtagsausflüge folgt der Weinstraße und bringt die Teilnehmer zu einer der größten Weinkellereien der Region, für kongreßerfahrene Esperantisten nichts unbedingt Neues; Neues; aber vielleicht gibt es bei der Weinprobe noch Überraschungen. Na denn Prost!

Der andere Ausflug bietet ein Wiedersehen mit Tarragona, seinen zahlreichen Ruinen aus römischer Zeit und seiner sehenswerten Kathedrale aus dem 12. Jahrhundert. In der Nähe der Stadt Reus wird das größte ländliche Anwesen auf Genossenschaftsbasis besucht. Das

Ziel des ganztägigen Ausfluges ist die weit verzweigte Mündung des größten spanischen Flusses: das Delta des Ebro. Dort ist ein einzigartiges Naturschutzgebiet entstanden, in dem viele Vögel aus Mitteleuropa den Winter verleben, falls sie es nach langem Flug geschafft haben, den schieß- und fangwütigen Jägern bestimmter Länder zu entgehen.

Am Freitag, dem 19. Mai, soll der Esperanto-Sonderzug die Teilnehmer wieder zum 280 km entfernten französischen Grenzbahnhof Cerbère zurückbefördern. Wer es noch nicht so eilig hat, reist am nächsten Tag zum Nachkongreß auf die Insel Mallorca. Leider lagen bei Redaktionsschluß noch keine Einzelheiten über das vorgesehene Beförderungsmittel (Schiff oder Flugzeug) sowie über den Aufenthaltsort vor. Mallorca bietet jedenfalls so viel Angenehmes und Sehens-

wertes, daß man mit Bedauern am 24. Mai die Rückreise antreten wird.

Vordrucke für die Anmeldung zum Kongreß wurden inzwischen verteilt. Mehrbedarf kann bei den Bezirksbeauftragten nachbestellt werden. Die Anmeldung wird erst wirksam, wenn außer dem Kongreßbeitrag (für IFEF-Mitglieder bis 30. April 1989 etwa 99,- DM) mindestens noch die Hotelkosten für einen Tag, also 26,- DM überwiesen worden sind. Die Bezeichnung des Bankkontos im Aliqilo ist nicht ganz vollständig. Hier die kompletten Angaben: Caixa de Pensions „LA CAIXA“, Str.Tarragona 100, E-08015 Barcelona. Konto-Nummer: 857.01.0004067-10 (Esperanto-Kongreso). Alsdann: Gute Reise und auf Wiedersehen am 13. Mai 1989 in Salou!

W.B.

## AL HISPANIO SUR NORMALĴPURO

La hispana registraro decidis jarfine 1988 - eble en eŭforio pri Eŭropa - ŝanĝkonstrui ĉiujn fervojliniojn en Hispanio al normalŝpuro (1435 mm) en la daŭro de 15 jaroj. Tiel raportis la gazetaro, sed la sama fonto asertas, ke en Hispanio kaj Portugalio oni ĝis nun veturas sur „rusa larĝa ŝpuro = 1,69 m“ kaj ke la hispana fervojreto ampleksas 1300 km. Fakte estas, ke la reto de RENFE ampleksas 13 509 km, el ili 13 490 km kun larĝa ŝpuro de 1 668 mm (la ŝpuro en Sovetunio estas 1 524 mm). Ĉu oni eble volas ŝanĝkonstrui nur la plej gravajn liniojn? Fervoja leksikono de 1979 jam mencias planon pri grandrapideca linio (300 km/h) Port Bou - Barcelona - Madrid, kaj la enciklopedio de Meyer (1981) asertas, ke jam ekzistas normalŝpura trako de Port Bou ĝis Valencia, konstruita por la eksporto de oranĝoj.

Skeptikaj estis kolegoj de RENFE, kiujn mi demandis. Ili konfirmis „iun registaran decidon“, sed ili atentigis, ke ĝuste sur la ĉefaj linioj oni uzas betonajn ŝpalojn kaj en ilin oni ne povos bori „novajn truojn“ por mallarĝigi la ŝpuron. . .

Estu kiel ajn: post la IFEF-kongreso en Salou ni scios pli, ĉar la fakprelego tie temos pri novkonstruota normalŝpura trako de Port Bou al Barcelona. . .

Ritt

## El la grupoj

### Frankfurt

S-ino Elfriede Kruse, membro de GEFA kaj iama sekretariino de IFEF, estas invitita la 23an de novembro 1988 flanke de la heslanda radiostacio al intervjuo. En la kadro de posttagmeza aktuala sendaĵo ŝi respondos multajn demandojn rilatajn la Esperant-movadon, pri la eblecoj de lernado kaj pri sia agado kiel UEA-delegitino. Tiu intervjuo rezultis el la indiko „Esperanto“, sub kiu la adreso de s-ino Kruse estas trovebla en la telefonlibro.

W.B.

### Esperanto auf chinesischen Kurzwellen.

Radio Peking strahlt jeden Tag Sendungen in der internationalen Sprache Esperanto in seinem Kurzwellenprogramm aus.

Die Sendezeit für Europa ist 20.00 h - 20.30 h auf den Wellen 40,1 (7410 khz), 32 (9365 khz) und 30,1 (9965 khz).

Weitere Sendungen in Esperanto werden nach Lateinamerika, Japan und Korea sowie nach Südostasien ausgestrahlt.

In der Bundesrepublik werden bisher noch keine Sendungen in Esperanto produziert.



## Frankfurt

### Auf sicheren Gleisen: Eisenbahn-Fachwörterbuch fertiggestellt.

Genau 10 204 Fachausdrücke aus dem Eisenbahnwesen enthält das Fachwörterbuch, das auf dem Kongreß des internationalen Eisenbahner-Esperanto-Verbandes vom 04. - 10. 06. 1988 in Perpignan vorgestellt wurde. An ihm haben Spezialisten aus 14 Ländern unter der Leitung von Gernot Ritterspach (BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt) viele Jahre lang intensiv gearbeitet.

Mit einem alphabetischen und einem numerischen Teil ist es fachlich genauso aufgebaut, wie das offizielle Fachwörterbuch der Internationalen Eisenbahn-Union (UIC), das bisher in 6 Sprachen vorliegt. Die Esperanto-Version soll jetzt als Ausgangspunkt für weitere zweisprachige Ausgaben dienen.

Von allen Berufsgruppen haben die Eisenbahner Esperanto bisher am intensivsten angewendet, nach dem Motto „Schienen verbinden die Länder, Esperanto verbindet die Völker“.

## Esperanto-Fernkurs

Esperanto ist eine internationale Sprache. Die Grammatik ist einfach und logisch; sie besteht nur aus wenigen kurzen Regeln. Es gibt keine Ausnahmen und Unregelmäßigkeiten.

Esperanto wurde für die internationale Kommunikation geschaffen. Der neu aufgelegte Esperanto-Sprachkurs mit Lehrbuch, Tonbandkassette und brieflicher Betreuung ermöglicht es, daß jeder zu Hause Esperanto lernen kann. Zeitpunkt des Beginns, tägliche Dauer, Umfang, Lerntempo kann jeder selbst bestimmen. Experten beraten schriftlich, individuell und nach jedem Lernschritt.  
Kurskosten: 30,- DM

Bestellung: Einzahlung auf das Postgirokonto 61 150-466 beim Postgiroamt Dortmund.

Empfänger: Joachim Schrapf, Schmittingheide 17 d, 4400 Münster (Westf.)

EDS-Anschrift:  
BSchule 440 Münster (Westf.).

## Nekrologo

La 1-an de decembro 1988  
sinjoro

**Paul Keil (88)**

forlasis ĉi tiun mondon.

Tuj post la lasta milito li lernis Esperanton kaj fondis la fervojistan Esperanto-movadon en la tiama Reichsbahndirektion Kassel. Li diligente kaj celeme ĉiam varbis por Esperanto. Estis lia merito, ke fondiĝis la grupoj Fulda, Hann.-Münden kaj Kassel.

Sinjoro Keil ĉiam estis tre vojaĝema kaj partoprenis multajn Esperanto-kongresojn.

Per nia partopreno ĉe lia enterigo ni elmontris al li la lastan honoron. Li nun ripozas en paco!

Al lia edzino ni esprimas nian sinceran kondolencon.

GEFA kaj  
Fervojista Esperantogrupo  
Kassel

## Termine

Am 18. 3. 89 treffen sich der Arbeitsausschuß und die Beauftragten für Esperanto zu einer gemeinsamen Sitzung in Würzburg.

Der 41. IFEF-Kongreß findet vom 13. - 19. Mai in Salou/Spanien statt.

Der Nachkongreß auf der Insel Mallorca vom 20. - 24. 5. schließt sich hieran an. Anmeldevordrucke halten die Bezirksbeauftragten vorrätig.

Das Seniorentreffen 1989 wird im Bezirk Frankfurt/Main vorbereitet.

Vom 6. - 8. 10. findet die 33. Jahresversammlung in Verden/Aller, Bez. Hannover statt. Mit Bulteno 2/1989 dem Anmeldevordrucke beigelegt werden, soll Verden und der Ausflug zum Vogelpark Walsrode vorgestellt werden.

Die JV 1990 soll zusammen mit den Beneluxländern und den Eisenbahnern aus Frankreich in Luxemburg ausgerichtet werden.

## Bremen

### NIA AVENTURO

La varbentreveno dum la „ARBERGER DORFFEST“.

Iam post la oka mia kaj mi estis surloke en Arbergen kaj metis la objektojn el la aŭto. Vigla vivo jam estis ĉirkaŭ ni, ĉar ekestis buda vilaĝo sur la stratoj kaj placoj.

Sinjoro Marzahn ankaŭ venis tiel frue por helpi elpaki; tiam ni devis rapide forigi la aŭton el la „gaja zono“.

Ni aranĝis nian standon. Sep varbtubulojn ni fiksas sur antaŭĝardena krado. Ekestis per tio belaspekta fono. Ni havis taŭgan faldeblan tablon kiu ne estis tro granda por ne kaŝi niajn tabulojn. Sur la tablon ni etendis objektojn, kiujn interesitoj povis kunpreni laŭplaĉe. Temes pri eksterlandaj ĵurnaloj kaj varbiloj.

Jam venis la unuaj interesitoj por rigardi, precipe la apude sin instalintaj verduloj ofte vizitis nin.

Rekte apud ni estis vintrinkejo kun surstrataj benkoj. La trinkantoj rigardis rekte al ni. Tagmeze oni lokigis gulaŝkanonon en nian proksimecon. Tiel Esperanto estis en la mezo de la vivo - kiel ja decas!

Baldaŭ alvenis s-ro Knapp por helpi. La publika alproksimiĝo amasiĝis jam. Venis s-ino Bohn kaj iom poste s-roj Krüger kaj Grebe, ambaŭ per bicikloj! Ankaŭ s-ro Petersen envicigis sin inter la helpantoj, estis gaja, vigla vivo en nia stando. Ni parolis inter ni en Esperanto kio evidente impresis la interesitojn.

Posttagmeze alvenis s-ino Kuhl-Kruse kun nia plej juna membro, la kara Miki. Ili kunportis kasetradion por per ĝi aŭdigi Esperantaĵojn (Kelkaj interesitoj volis tuj aĉeti la ilon).

Preskaŭ je la 17a horo ekpluvis. Ni rapide enpakis la aĵojn kaj fuĝis al la aŭto.

Resume mi povas diri, ke nia entreveno estis tre sukcesa, el diversaj vidpunktoj: Kelkaj interesitoj petis pri konstanta informo, multaj eksciis ion pri Esperanto, ĉiuj povis konstati, ke Esperanto en

Bremen forte vivas. Sed samgrave estas, ke niaj membroj kun ĝojo tiel aktive kunlaboris kaj helpis!

KORAN DANKON, ke vi ĉiuj tiel subtenis min!  
Dieter Hartig

### EL SOVET-UNIO, de Leningrad,

vizitis nin matene, la 12an de oktobro 1988 juna bibliotekistino. Matene Lisa kaj Dieter Hartig akceptis ŝin kaj la akompaninton s-ron BRANDENBURG en la stacidomo de Bremen. Ni gvidis ilin tra nia beleta urbo kaj travivis agrablajn horojn.

Precipe la inoj multe babilis pri inaj aferoj - absolute ne problema por Esperantistinoj!

Tagmeze ni adiaŭis; ŝi diris:  
„Mi nepre revenos al Bremen!“

### Die BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt

lädt zu den monatlichen Treffen nun ein in das Besprechungszimmer 111 (I. Stock), Poststraße 6, 6000 Frankfurt (im sog. Ämtergebäude, gegenüber Nordausgang Frankfurt Hauptbahnhof).

Die Klubabende finden jeweils um 16.30 Uhr an folgenden Tagen statt:  
21. 02. 89, 14. 03. 89, 18. 04. 89,  
20. 06. 89, 18. 07. 89, 19. 09. 89, 14. 11. 89  
und 19. 12. 89.

Im Mai, August und Oktober 89 fallen die Treffen wegen internationaler bzw. regionaler Esperanto-Veranstaltungen aus.

Kiefer

Im **Bezirk Nürnberg** werden nunmehr die Veranstaltungen in Lichtenfels angekündigt.

De la 12-a ĝis la 22-a de julio 1989, internacia Renkontiĝo de esperantistaj edukistoj (Freinetpedagogio) okazos en STE-FOY-LA GRANDE, inter Bordoza kaj Centra Montaro, (Francio). Sin turni al Paul POISSON, 239 rue Victor Hugo, F-37540 ST CYR LOIRE, Francio.



## Essen

Im BSW-Mitteilungsblatt des Bezirks wurden unserem Kollegen **Rolf Terjung** zwei Seiten zur Verfügung gestellt, um einen Bericht über unsere 32. Jahresversammlung in Kaiserslautern zu veröffentlichen.

Wir danken unserem Freund für diese gelungene Darstellung über unsere Arbeit (mit Bild) und das Echo das unsere Veranstaltung auslöste.

Die Nachahmung wird jedem Beauftragten empfohlen.

Außerdem wurde in der gleichen Ausgabe auf unseren Fernkurs hingewiesen, den wir ebenfalls aus dem Bezirk Nürnberg und wahrscheinlich auch in den übrigen Bezirken lesen konnten.

## Zamenhoffeier der Esperantengruppe Lichtenfels.

Am 13. 12. 1988 trafen sich die Esperantisten der Gruppe Lichtenfels in der Gaststätte Wallachei in Lichtenfels zu einer Gedenkfeier von Dr. Zamenhof, Begründer der internationalen Sprache „Esperanto“. Gruppenleiter Hans Müller konnte die Mitglieder aus Lichtenfels und Coburg willkommen heißen. Nach einem kurzen Rückblick auf das 100jährige Bestehen von Esperanto zeigte Hans Müller Dias vom internationalen Esperantokongress der Eisenbahner in RIMINI. Anschließend saß man noch in gemütlicher Runde zusammen und hörte Lieder aus aller Welt in Esperanto.

H. Wendt

## El la fervoja mondo

### Federacia Respubliko Germanio:

La Germana Federacia Fervojo (DB) sukcese praktikas intensan kunlaboron kun flugkompanioj. Per la oferto „Rail & Fly“ aviadaj pasaĝeroj, posedantaj flugbileton tien-reen, povas atingi fervoje je favora totalsuma prezo ĉiujn pligrandajn flughavenojn. La transporto per publikaj trafikiloj inter urbomezo kaj flughaveno estas inkluditaj en la prezo. Tiu ĉi totalsuma oferto validas unu tagon

antaŭ la aviado, la tagon de la ekaviado mem, la reventagon kaj unu tagon post la reveno. Ĝi etendiĝas ĝis flughavenoj Hamburg, Bremen, Hannover, Düsseldorf, Köln/Bonn, Frankfurt/Main, Saarbrücken, Stuttgart, Nürnberg, München.

### Kanado/Usono:

La fervojistoj en Kanado kaj Usono interkonsentis pri unuecaj kriterioj en la konstruado de modernaj trajnkontrol-sistemoj. Tiuj komputile subtenataj sistemoj liveras al la centraloj precizajn indikojn pri pozicio de la trajno, ĝiaj rapidecon kaj direkto. Ili estos enkondukataj de dek ses plej gravaj fervojoj de Kanado kaj de USONO.

### Danlando:

Mallongaj IC-motorvagonoj por tramtrafiko.

En Danlando estas produktataj nuntempe 23 dizel-hidraŭlikaj IC-trajnoj, kies kompleta elektra ekipaĵo estas liverata de la firmao AEG el FR Germanio. Tiuj novaj trajnoj ruliĝu en IC-trafiko sur Zelando kaj Jutlando. Pro tio la trajnlongeco de la triparta trajno devis esti akordigata kun la pramsipo je 59 m. Ĉe tio ĉiu unuopa vagono kun 19,6 m estas pli mallonga ol la normalaj IC-vagonoj, kiuj mezuras 26,4 m-ojn. La unua motortrajno estis liverata jam en januaro 1988. Ĝis meze de la naŭdekaj jaroj estos liverataj entute 80 de tiaj trajnoj.

Busse

---

## Köln / Essen

Hanna Schindler, Schwelm, hat ein neues Mitglied geworden.

Wir begrüßen Herrn Oberstudienrat Wolfgang Loose (16. 9. 1947), wohnhaft in 4755 Holzwickede, recht herzlich.

Obwohl im Bezirk Essen wohnhaft, wünscht unser neues Mitglied sich der Gruppe Schwelm anzuschließen.

---

**Estraro kaj komisiitoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio  
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojoj  
Stato: januaro 1989**

**Estraro**

**Prezidanto:** BAR a. D. Giessner,  
An der Nicolai-Schule 3, 3420 Herzberg  
am Harz, tel. 0 55 21 / 45 86; EDS:  
Bf 342 Herzberg (Harz)

**Vicprezidanto/Redaktoro:**

BAR a. D. Grass, Sachsenstraße 7,  
8620 Lichtenfels, tel. 0 95 71 / 64 68  
EDS: Ga 862 Lichtenfels, Abhofach

**Sekretario:** BHS Riehn, Bm 680 Mannheim,  
Basa 953/899/536  
Privata adreso: Richard-Dehmel-Str. 3,  
8700 Ludwigshafen/Rhein,  
tel. 06 21 / 58 24 43

**Distriktaĵ komisiitoj:**

**Essen:** BBI a.D. Rolf Terjung,  
Finkenschlag 68, 4100 Duisburg 26,  
tel. 02 03 / 72 40 95;  
EDS: Bf Mülheim/Ruhr-Hbf (por ne urĝaj  
sendoĵoj)

**Frankfurt/Main:** BAR Kiefer, BSA 600  
Frankfurt/Main. AA 341, Basa 955/5656  
Privata adreso: Erthalstr. 6, 8770 Lohr/Main,  
tel. 0 93 52 / 67 07

**Hamburg:** BHS Böhnke, Bf 240 Lübeck,  
Basa 947/862/374

**Hannover:** BBI a. D. Heimlich,  
Bf 304 Soltau/H., tel. 0 51 91 / 52 13

**Karlsruhe:** BOS Bernhard, Bf 680 Mann-  
heim Rbf.

**Köln:** BAmtm a. D. E. Herlitze,  
Prof. Neu-Allee 32, 5300 Bonn 3,  
tel. 0 228 / 46 28 82,  
EDS: Betr.St. Fka 530 Bonn Hbf

**München:** BHS Lenz,  
800 GV München Nord, Basa 962/1528

**Nürnberg:** TBOAR Röder, BD 850 Nürnberg  
B 8201, Basa 966 / 5671

**Saarbrücken:** BBI a. D. Haupenthal,  
Brennender-Berg-Str. 28  
6603 Sulzbach/Saar, tel. 0 68 97 / 38 56  
EDS: Betr.St. 660 Fka Saarbrücken Hbf

**Stuttgart:** TBOAR Krüger,  
BD 700 Stuttgart, MW 0013; Basa 952/3125

**Specialaj komisiitoj**

**Kasisto:** BOS Bernhard, Bf 680 Mannheim  
Rbf.

**Fakterminaro:** LBI a.D. Dieter Hartig,  
Kasseler Str. 76,  
2800 Bremen 1, tel. 04 21 / 35 33 39  
EDS: Bezk. 280 Bremen

BOAR Ritterspach, ZA 650 Mainz, Pm 1403  
Basa 954/5533

**Lingvaj ekzamenoj kaj instruado:**

BOAR a.D. Fritz Lautenbach,  
Abstor 21, 6400 Fulda, tel. 0661/77627;  
EDS: Esperanto-Gruppe, 640 Fulda

**Bulteno-dissendo:**

BOS a. D. Heinz Schindler,  
Max-Klein-Straße 21, 5830 Schwelm,  
tel. 0 23 36 / 1 56 54, EDS: Fka 583 Schwelm

**Emerituloj:**

BHS-in a. D. Elfriede Kruse, Wiener Str. 121  
6000 Frankfurt/Main 70, tel. 0 69 / 65 73 65  
EDS: Betr. St. Fka 605 Offenbach (M) Hbf

**Arkivo:** BHS Riehn, Bm 680 Mannheim,  
Basa 953/899/536

**IFEK-kontaktadreso:**

BAmtm a. D. Otto Rösemann, Ringstr. 14 D,  
3067 Lindhorst, tel. 05725/7992,  
EDS: Betr.St. Bf 306 Stadthagen

**Gazet-kolektejo kaj -forluado:** BAR Kiefer,  
BSA 600 Frankfurt/Main, AA 341,  
Basa 955/5656

**Specialaj taskoj:**

BOAR a. D. Barnickel,  
Tiroler Str. 12 b, 6000 Frankfurt/Main 70,  
tel. 069/632372  
EDS: Betr.St. Fkk 600 Frankfurt/Main Süd

**Peto al la eksterlandaj geamikoj!**

Jen ni komunikas la aktualan adresaron  
de la GEFA-estraro kaj de la komisiitoj.  
Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale  
ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii  
la akuratan akcepton.

**Redaktfino por n-ro 2/89 estas la 25.3.1989**